



Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Novembro : 4 2022

SKOTLANDA PARLAMENTO NE ESTAS KOMPETENTA POR KUNVOKI NOVAN REFERENDUMON

La Supera Kortumo de Britio decidis unuanime, ke la Skotlanda Parlamento ne estas kompetenta en la aprobo de leĝo por kunvoki referendumon, ĉar tio devas esti decidita de la Brita Parlamento.

Al ĉi tiu kortumo apartenas kvin juĝistoj kiuj en la juĝo sciigis, ke laŭ la Akto de Aŭtonomio, aprobita por Skotlando en la jaro 1998, ties parlamento ne povas kunvoki referendumon, se per tiu konsulto oni decidas pri la unuiĝo de la tuta regnolando. Tiel, Lord Robert Reed, prezidanto de la tribunalo, deklaris, ke la unuiĝo inter Anglio kaj Britio restas for de la leĝa kompetento de la skota parlamento.

Advokatoj de la skota registaro atentigis pri la fakto, ke la rezulto de tiu ebla referendumo ne estas nepre realigebla, reale temus nur pri konsultiĝa referendumo. Tamen la Supera Kortumo diris, ke la rezulto de tiu referendumo havus rektajn konsekvencojn rilate la integrecon de la tuta ŝtato.



En la jaro 2014 la londona registaro akceptis proponon de tiu skotlanda, rilate la kunvokon de referendumo pri ebla sendependiĝo de Skotlando. Kvankam la rezulto estis favora al la daŭrigo de la unuiĝo, la rezulto ja estis ege streta, tiel 55% favore al la unuiĝo kun Anglio kaj 45% voĉdonis por la skota sendependiĝo.

Tiam, la ĉefa argumento por apogi la unuiĝon inter ambaŭ regnoj estis la certigo, ke Skotlando daŭre restos en la Eŭropa Unio se ili estas ene de Unuiĝinta Regnolando. Sed nun, post la *briteliro*, la ĉefa kialo de tiuj kiuj postulas novan referendumon estas ĝuste tio, forlasi Brition por aliĝi al Eŭropa Unio.

Vorto de la Semajno

Bigamio:

Stato de viro havanta samtempe du edzinojn, aŭ de virino havanta samtempe du edzojn.

Bigamiulo: Tiu kiu vivas bigamie.

Specife bigamio povas esti:

- **Poliginio:** Stato de viro, havanta plurajn edzinojn samtempe.
- **Poliandrio:** Stato de virino havanta plurajn edzojn samtempe.

Ordinare ĉi tiuj statoj estas konsiderataj kiel kontraŭ-leĝaj, tamen kelkaj ŝtatoj akceptas ilin.

Sinonimo: *Poligamio*

Enhavo de la numero 21 (2022:1) kiu aperos post kelkaj tagoj

JURA TRIBUNO INTERNACIA

- Paco, Justeco kaj Neŭtraleco.
- Vivo de la Asocio:
 - IJEA kunlaboris en la redaktado de lerno-materialo en Gimnazia Kurso.
 - Fondita la Unio Internacia de Advokatoj Esperantlingvaj.
 - *Jura Semajno*, nia ĉiusemajna informilo.
- Boliviamar, la ne-solvo al la bolivia mar-alira afero.
- Jura rilato inter la Kanada ŝtato kaj ĝiaj aborigenaj popoloj. La starigo de Nunavuto.
- Juraj Informoj:
 - Repago de trajna bileto pro prokrasto ĉiam eblas, eĉ se tio okazis pro neeviteblaj cirkonstancoj, laŭ la Eŭrop-unia Kortumo.
 - Verkistino kondamnita pro murdo de ŝi rakontita.
 - Plendo kontraŭ disko-kovrilo pro ebla infana pornografio malfruiĝis.
- Robotoj, rajtoj kaj devoj. La vojo al elektronika personeco.
- Novelo: *La kazo de la malklera tatuisto*.
- Jura Vortaro: *En kazo de dubo, favore al akuzito*.
- Galerio de elstaraj esperantistaj juristoj: *Maria Pontika*.
- Kino kaj Juro: *Atestanto de la Prokuroro*.